

La Laborista Esperantisto Arbetar-Esperantisten

Nr 3-4 | december 2015

N-ro 3-4 | decembro 2015

Tvåspråkig tidning utgiven av SLEA | Dulingva gazeto eldonita de SLEA



“Ne funebru pri mi - organizu vin!”

- Joe Hill 1879-1915

Innehåll | Enhavo
Unu tago rimarkebla
Novaĵoj de libroservo
Kantoj kiuj ne mortos
La predikisto kaj la sklavo
Proletär esperantokväll i Valencia
Birdo elektas la fuĝon - sed ni nenie!
Landet som finns överallt och ingenstans...

Arbetar-Esperantisten

är en tvåspråkig tidning på svenska och esperanto som ges ut av Svenska arbetaresperantoförbundet.

La Laborista Esperantisto

estas dulingva (sveda-Esperanto) membrogazeto de SLEA (Sveda Laborista Esperanto-Asocio).

Redaktionen / La redakcio:

Daniel Sandgren
Marcus Hansson

Retejo:

www.slea.se

SLEA en socialaj komunikiloj:

SLEA havas paĝon ĉe Visaĝlibro

Retpoŝto:

arbetaresperantisten@hotmail.com

La estraro de SLEA:

Prezidanto: Daniel Sandgren

Sekretario: Guy Coste

Kasisto: Marcus Hansson

Ceteraj estraranoj: Soile Lingman
Inga Johansson

SAT-perantino / SAT-kontakt:

Inga Johansson

Retpoŝto: ishim@hotmail.com



541-826

Svanmärkt trycksak
LaserTryck.se

Enhavo

sida / paĝo

• Gazeta informo	2
• Ledare / Redaktangulo	3
• Unu tago rimarkebla	4
• La predikisto kaj la sklavo	6
• Proletär esperantokväll i Valencia	7
• Landet som finns överallt och ingenstans...	8
• Kantoj, kiuj ne mortos	10
• Novaĵoj de libroservo	14
• Poemo de Stig Dagerman	16

Tack till Inga Johansson som bl.a. översatt *Kantoj, kiuj ne mortos* och Siv Burell som översatt *Birdo elektas la fuĝon - sed ni nenie!* Redaktionen vill även tacka alla andra som på något sätt bidragit till detta nummer och de som under året skänkt pengar till förbundet!

Org.nummer: 802401-1317

Plusgiro 5 31 60 - 8. (Sv.Arbetar.Esperanto-förb.)

**LASTA DATO POR LA
MANUSKRIPTOJ AL LA SEKVONTA
ELDONO ESTAS 2016-01-31.**

**SISTA DATUM ATT SKICKA IN
TEXTER TILL KOMMANDE NUMMER
ÄR 2016-01-31.**

Aper-plano 2016

februaro, majo, aŭgusto, novembro

Adreso de SLEA:

Svenska ArbetarEsperantoFörbundet
Box 64
563 22 Gränna
Sverige / Svedio

Ledare

På styrelsemötet i höstas beslutades att gå ut med ett erbjudande för nya medlemmar, att för 100 kr även få en bok, antingen La Korto eller läroboken Esperanto Direkt! Erbjudandet gäller fram till och med slutet av 2016. Vi måste bli fler medlemmar om vi på sikt ska kunna fortsätta att ge ut Arbetar-Esperantisten. Så nu vill vi uppmana alla medlemmar att försöka värva nya medlemmar i sin bekantskapskrets och sprida att vi finns! Ta kontakt med oss i redaktionen om du vill ha flygblad att lägga i din fackföreningslokal, stamhak, bibliotek eller vad det nu kan vara! Vi skickar gärna ut ett provexemplar av tidningen om du vet någon som du tror är intresserad. I övrigt så hoppas vi att ni ska uppskatta det här numret och så vill vi passa på att tacka alla som under året bidragit med texter, översättningar och idéer till tidningen! Stort tack även till er som bidraget med gåvor till förbundet!

Vi ses 2016!

Redaktangulo

La aŭtuna estrarkunveno decidis oferi, por la kosto de 100 kronoj, unu el du librojn, La Korto aŭ la lernolibro Esperanto Direkt por novaj membroj! La ofero validas ekde nun kaj dum la tuta 2016! Kun longa perspektivo ni necesas pli da membroj por daŭrigi la eldonadon de Laborista-Esperantisto. Do, ni instigas la tutan membraron varbi novajn membrojn, serĉante ene sian konataron kaj disvastigian ekziston! Kontakto la redakcion se vi volas havi flugfoliojn por meti ĉe via sindikatejo, kutimejo, biblioteko k.t.p. Ni volonte alsendas provexempleron se vi konas iun kiun povus havi intereson pri nia asocio! Cetere ni esperas ke vi ŝatos ĉi tiun numeron kaj samtempe ni kaptas la okazon por danki ĉiujn kiel dum la jaro sendis tekstojn, tradukojn kaj ideojn al la gazeto! Ankaŭ dankegon al ĉiuj kiel donis monojn al la asocio!

Ni revidos nin 2016!

Atentu!

Pri la enhavo de La Laborista Esperantisto respondas la kontribuintoj mem.

Uppmärksamma!

Skribenterna ansvarar själva för sina texter. Det är alltså inte nödvändigtvis SLEAs åsikter som presenteras.

SLEA JARKOTIZO / MEDLEMSAVGIFT 2016

- Unuopa membro/Enskild medlem 100:-
- Familia membro/Familjemedlem 30:-
- Ungdomar upp till 20 år, arbetslösa, studerande och pensionärer 80:-
- Stödmedlemskap för organisationer 200:-

Membriĝu / Bli medlem!

Plusgiro 5 31 60 - 8.
(Sv.Arbetar.Esperanto-förb.)

Unu tago rimarkebla

Teksto kaj muziko
de Sven Svensson



Ni vojaĝis tra nia granda vasta mondo
tra ebenlando, monto kaj valo

tra varmegaj dezertoj kaj malvarma neĝo
laŭ riveroj, trans lagoj, trans maroj.

Ĉiujn fratojn kaj fratinojn, ni renkontas
tre malsame aspektas.

Ĉiun eksteron, ni travivis, faras diferencon
sed niaj sentoj nin kunigas.

Kaj tial ni kantas:

Ni esperas, kaj kredas
ke unu tagon rimarkeblan

la fortego solidareca, ŝanĝiĝas la limojn naciajn
de realeco, al historiaj memoroj nuraj.

Ĉiujn murojn inter homoj, ĉiujn barojn metitajn
ni rompos peco post peco.

La armiloj ripozos en tempo kaj eterno
kaj ni vivos, en paco kaj libero.

Ĉi tiu versio registrigis kompaktan diskon dum la somero 2015. Aŭskultebla ĉe la
retpaĝo www.slea.se

Denna låt spelades in på CD sommaren 2015 och går att lyssna på på SLEA:s hemsida,
www.slea.se.

Pri la kanto Unu tago rimarkebla

La kanto estis verkita pro la 65a jarjubileo de SLEA en Limhamn inter 1985-1986 kiel omaĝo kaj danko al doktoro Ludoviko Zamenhof.

Estis prezentita en ĝis nun sola okazo de la triopo da muzikistoj, nome Alf Carlsson, lia edzino Ingela (Bood) Carlsson kaj Sven Svensson.

La projekto de la kanto estis verkita en la sveda, tradukita al esperanto de mia patro Ivar Svensson, kiu estis membro en SLEA-Limhamn.

Tio estas reverkita kaj improvizita versio laŭ kiel mi memoris la tekston kaj tio ne montras la esperantokonojn de mia patro, kiujn mi opinias bonajn.

de Sven Svensson

La kanto estas aŭskultebla ĉe la retpaĝo www.slea.se

Om sången Unu tago rimarkebla

Sången skrevs till SLEA:s 65-årsjubileum i Limhamn, omkring 1985-86, och tänktes som en hyllning och ett tack till doktor Ludwig Zamenhof. Den framfördes vid detta, och hittills enda, tillfälle av en trio bestående av Alf Carlsson och hans fru Ingela (Bood) Carlsson, samt Sven Svensson.

Utkastet till sången skrevs på svenska och översattes till esperanto av min far Ivar Svensson som var medlem i SLEA Limhamn.

Detta är en rekonstruerad och improviserad version efter hur jag minns texten och inte representabel för min fars esperantokunskaper, som jag tror var goda.

Sven Svensson

Låten går att lyssna på på sleas hemsida www.slea.se

La predikisto kaj la sklavo

(Torto post la morto)

de Joe Hill

Teksto de Joe Hill (1911),
trad. Vito Markovo k Gari Miklo
(Gary Mickle) (2008)



Longharuloj eliras dumnokte,
Vin instruas pri virta vivo dokte ;
Sed se vi demandetas pri manĝo,
Ili jen respondadas sen ŝanĝo :

Ĝis pensato manĝos vi
Supernube en ĉiela idili' .
Labor' , preĝ' ; vivo-streĉ' ,
Sed jen tort' , ĝua sort' , post la mort' !

Kaj la Malsatarmeo spektaklas,
Jen kantadas, preĝadas, manklakas,
Ĝis vi lastan moneron fordonas,
Por vi trampo denove jen sonas :

Ĝis pensato manĝos vi...

Ruliĝantoj Saltantoj eliras,
Kaj ĉu hurle, ĉu salte, ebrias,
« Vian monon al Jesuo donu
Tiel ĉiuj resaniĝos nun ! »

Ĝis pensato manĝos vi...

Se vi ŝvitas por edzin' kaj idoj -
Provas ĝueti iom da ridoj -
« Vi, pekant' , malbonul' » ili diras,
Kaj ĉe l' mort' al infero vin tiras.

Ĝis pensato manĝos vi...

Laboruloj de l' Ter' , unuiĝu,
Solidare por liber' batalu ni, ĉu ?
Kiam ni la plebanoj venkantos,
Al la fiprofituloj ni kantos :

Ĝis pensato manĝos vi
Kiam kuro por ĉiuj ni.
Lignohak' : eka task' ;
Manĝos vi kiam pretos la tort' !

Notoj

[1] laŭvorte "Longharaj predikistoj" en la anglalingva originalo

[2] Malsatarmeo : traduko de "Starvation Army", vortludo je "Salvation Army", t.e. Savarmeo

[3] "sanktaj ruliĝantoj" (vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Holy_Roller) nomiĝas anoj de kristanaj-fundamentistaj konfesioj ; la nomo estiĝis pro tio, ke iuj el ili kutimas fali en ekstazon, krii, ruliĝi sur la planko k.s. dum la diservo

Proletär esperantokväll i València



Fredagen den 24 juli genomfördes en proletär esperantokväll i Arbetsfolkets klubblokal Fransesc Santacatalina i València, Spanien. Alla föreläsare var medlemmar i fackföreningen COS (Fackliga Arbetar-Samordningen), som redan godkänt esperanto som ett internationellt språk värt att försvara. Alla föreläsningar finns att hitta på både COS hemsida (<http://www.sindicatcos.cat/>) och Arbetsfolkets klubblokals hemsida. Den första föreläsningen handlade om esperantos historia och dess möjligheter i samhällsomvälvningen mot ett demokratiskt klasslöst samhälle. Den andra föreläsningen var en snabbkurs i esperanto för människor som inte kan språket och för nybörjare som gått en liten kurs. Den tredje föreläsningen handlade om esperantohjälpmiddel på internet: verktyg för språkinläring, böcker, musik, filmer osv. Och den sista föreläsningen visade historiska affischer kopplade till vårt språk.

Det är värt att understryka att SAT (Arbetaresperantisternas världsorganisation) nämndes på alla föreläsningar.

Nätutgåvorna av dessa dokument syftar till att fortsatt verka som bildningsresurs. Språket på föreläsningarna och så även på dessa är på katalanska, som utan tvivel är lätt att förstå för talare av latinska språk.

Al ĉiuj niaj membroj de SAT:

Ne plu pagu vian SAT-kotizon al plusĝiro 26 63 22-7
uzu plusĝiro de SLEA 5 31 60 -8

2016 Plena kotizo SEK 535:-

2016 Duona kotizo SEK 285:- (senlaboruloj, familianoj, emeritoj kaj junuloj)

Informu viajn samideanojn en SAT kaj novajn membrojn de SAT.

Inga johansson, SAT-peranto en Svedio

Landet som finns överallt och ingenstans...

Det var tidigt 1980-tal och jag och mina kamrater brukade sova på vandrarhemmet "Active University" i Köpenhamn. Man fick gå långt, hela "Ströget" fram till Kungens Nytorget och sedan ytterligare många kvarter innan man var framme.

Den här gången var det högsommar och stekande hett. När vi kom in i huset stod föreståndaren, filosofiprofessor Kjell Sellin och försökte laga en trasig dusch. Han hade hjälp av två killar från Australien. I matrummet satt en engelsk tjej och några fransmän och spelade kort. På något sätt kändes det alltid som om man kunde andas fritt när man väl kommit fram till Kjells oas.

Kjell var den här gången extra entusiastisk, han hade nyligen varit på esperantokongress och nu skulle han frälsa oss "hippies" för världsspråkstanken. Samlingssalen hade gjorts i ordning till ett klassrum och Kjell distribuerade små stencilhäften. En projektor visade grundläggande språkregler varvat med bilder från Esperantolandet, landet som finns överallt och ingenstans.

Väl hemma i Sverige hälsade jag på farmor och berättade att jag fått en kortkurs i esperanto. Ur hennes mun kom då en ström av obegripliga ord och jag satt plötsligt med hakan i knäet.

Min gamla farmor som visserligen alltid hade varit "röd" men var i mina ögon mest förknippad med kakor och bullar hade alltså i sin ungdom umgått i kretsar där unga arbetare och arbeterskor lärde sig esperanto.

I vårt samtal om världsspråket började hon blomma och när fotoalbumet togs fram pekade hon ut sina kamrater och berättade om ett för mig helt okänt liv.

Bilden här är hämtad ur den anarkistiska esperantogruppens arkiv som finns på arbetarrörelsensarkiv och bibliotek och visar en utflykt i början av 1930-talet. I detta arkiv finns även en omfattande samling "esperantobrev" från stora delar av världen. Under 1930-talet upphörde breven efterhand att komma.



Esperanto var av nationalister, röda som bruna, ett fruktat språk

och det bekämpades därför i länder där fascister och stalinister regerade.

Förmodligen är det få som i dag känner till att det finns en särskild organisation för esperantister inom arbetarrörelsen, Svenska Arbetar-Esperantoförbundet eller som det heter på det egna språket, Sveda Laborista Esperanto-Asocio, SLEA. Förbundet propagerar för esperanto inom vänsterrörelsen och bland andra progressiva människor. Man samarbetar även med liknande organisationer i andra länder i det nationellt oberoende världsförbundet, Sennacieca Asocio Tutmonda, ”SAT”.

Lars Gogman

**Anslut dig till
arbetaresperantisterna.
Bli medlem i SLEA idag!**

ERBJUDANDE! Teckna ett medlemskap i SLEA för 100 kr så får du förutom vår tidning, Arbetar-Esperantisten 4 ggr/år, en bok på köpet. Välj en av följande böcker:


La Korto (en vittnesskildring om ett modernt statarsystem, mitt ibland oss, på esperanto) av Kristian Lundberg

Esperanto Direkt (lärobok för nybörjare, svenska-esperanto) av Stano Marček.

Erbjudandet gäller alla nya medlemmar t.o.m. 2016-12-31.

Betala in din medlemsavgift på följande plusgiro:
5 31 60 - 8 (Sv.Arbetar.Esperanto-förb.)

Kontakta oss: arbetaresperantisten@hotmail.com



Kantoj, kiuj ne mortos

Teksto de Jane Morén

Esperantigita de Inga Johansson

el la gazeto *Klass* nr 2 - 2015

(<https://arbetarskrivare.wordpress.com/klass-nr-2/>)


Ĉi jaro estas 100 jara memoro de sved-usona kantverkisto, sindikatisto kaj laboristo Joe Hill, kiu estis ekzekutita en Utah, malgraŭ grandegaj protestoj.

Liaj kantoj ankoraŭ hodiaŭ estas parto de la usona kantotrezoro. Daŭre la kantoj inspiras plurajn homojn. En Svedio ne same fame konataj sed dum la jaro oni atentis lin multmaniere. Precipe en lia hejmurbo Gävle, kie lia infanaĝa hejmo nun estas muzeo.

Joel Emanuel Hägglund (Joe Hill) naskiĝis en Forsby, apud Gävle 1879.

Lia patro Olof Hägglund estis konduktoro en la fervojo, Gävle-Dala Jernvägar. En lia laboro ankaŭ estis rel-komutado. Foje li falis sub trajno, unue li pensis, ke li ne serioze vundiĝis, kaj pluen honteme laboris. Sed male estis tre serioze. Kelkajn semajnojn poste li fine alvenis malsanulejon kaj tie ili trovis internajn sangadojn. Sur la operaciotablo li ne travivis, sed mortis nur 41 jara.

Joel, nur 8 jara kaj senpatra. Severaj tempoj. Lia patrino ankaŭ malsanis, ĉar nur du monatoj pli frue naskis la plej junan gefraton. Tamen, dank' al kalandriko, kiu donis al la familio iom da mono, kaj luenspezoj pro ĉambro en la domo, kiun ili aĉetis 1880, ili kuntenis la familion ĝis patrino mortis post pliaj 15 jaroj.



Bildoj el la Joe Hill-domo. Nuntempe muzeo.

Do estis 1902. Oni vendis la domon. La gefratoj disiriĝis. Joel kaj juna frato transmigris al Usono. Ekis la ĉapitro kiu famigis Joe Hill kiel konata kantopoevisto dum nur 10 jaroj.

Kiam Joel albordiĝis la usonan teron li havis 23 jarojn. Jam li laboris dum 13 jaroj kaj ankaŭ estis iom malsana. Periode li estis flegita pro haŭt-tuberkulozo. Verŝajne li esperis pri turniĝo al pli bona vivo. Sed en Usono ne atendis pli facila vivo, kiun li kaj aliaj enmigrintoj esperis. Vivkondiĉoj ofte estis same aŭ eĉ pli malbonaj ol en hejma lando. Esti laboristo kaj havi emon organizi sin por plibonigo, estis tre danĝera.

En la nova lando Joe vojaĝis en ĉiu direkto, kiel aliaj kaj serĉis laboron. Li havis ĉiajn okazajn laborojn en diversaj orientmarbordaj ŝtatoj. Li i.a. perdis laboron kiam li provis krei kaj fondi metian sindikaton. Kiam li havis 26 jarojn, li vojaĝis okcidenten al marbordurbo San Pedro, kie li aliĝis en nova sindikata federacio; The Industrial Workers of the World (IWW).

Li ekengaĝis, helpis organizadi. Ĉar li estis tre muzikema kaj iam ludis kaj kantis, ek de infanaĝo en forta libereklezia movado kie li kreskis, li komencis uzi la muzikon kiel apogo al la agitado. Li verkis novajn tekstojn al jam konataj melodioj.

Kaj liaj tekstoj, ankaŭ liaj desegnaĵoj estis en la eldonaĵo Solidarity. Li ankaŭ ĉirkaŭvojaĝis kiel delegito.

Joe Hill opiniis ke pamfleto baldaŭ estos forgesita, kvankam bone vortigita, oni legus pamleton nur foje kaj poste forĵetus. Sed la kantojn, la laboristoj konas parkere kaj rekantas. Tial li verkis kanton post kanto pri la vivo kiel laboristo kun necertaj, pezaj kaj subsalajritaj laboroj. Kantoj pri malsato kaj eta kompreno, kiun la laboristoj renkontis en malfacila realo. I.a. li verkis la konatan kanton "The Rebel Girl" dediĉe al Elizabeth Gurley Flynn, konata elstara ino en klasbatalo. Joe Hill aprezis la inan partoprenadon en la batalo kaj volis ke la laborkondiĉoj de virinoj veku pli da atento.

Du aliaj konataj kantoj estas "The Preacher and the Slave" (La predikisto kaj la sklavo) kaj "Casey Jones".

"The Preacher and the Slave" temas pri la sola aĵo kiun preĝejo povas promesi al malsataj laboristoj: pasteĉopeco en ĉielejo (en alia traduko bovda fileopeco).

La kanto "Casey Jones" temas pri fervojisto, kiu ne montras sin solidara kun siaj laborkolegoj sed havas lojalecon al labordonanto. Tio poste rezultas al lia morto en akcidento, kaŭze de malbona ripara prizorgado.

Joe Hill estis grava gvidantulo al siaj kolegoj kaj kunuloj. Lia lasta kaj severa batalo li havis en Utah, por la subsalajritaj laboristoj en kupra minejo.

La rezisto de la dungantaro estis tre severa kaj dum malfrua vespero en januaro 1914 okazis tion kio kondukis al la morto de Joe Hill.

Nutraĵvendisto kaj lia filo estis pafitaj dum perforta ŝtelo. Dum la sama tempo anoncis kuracisto, ke li surmetis bandaĝon al Joe Hill, kiu havis pafvundon.

Dum pridemano, Joe Hill rifuzis menciis, kiu lin pafis aŭ kio okazis sed asertis ke li estas senkulpa al la duobla mortigado en la nutraĵvendejo. Li diris ke li havigis la vundon dum disputo pri virino, tre evidente.

La vero ankoraŭ ne sin montris.

Sed preskaŭ ĉiuj, kiuj engaĝiĝis kune opiniis ke li estas senkulpa. Tre indikas ke tio estas intenco por forigi tia forta elstara figuro en la sindikata movado, eble ankaŭ forigi sendiulo en la mormongvidata Utah.

Joe Hill estis kondamnita je mortpuno pro la murdo, kondamno baze de pruvado per indikaĵoj. Tiam fama advokato de kriminala tribunalo elkondamnis la verdikton kiel jura skandalo. Eĉ Usona prezidento kaj sveda ministro en Washington, kaj pluraj aliaj tiamaj konataj personoj pridubis la verdikton.

(el Vikipedio: La afero etendiĝis al nacia nivelo. La prezidento Woodrow Wilson, Helen Keller kaj Svedio petis kompaton, kaj sindikatoj en la tuta mondo defendis lin.)

Lia amiko Oscar W Larsson tre engaĝiĝis por liberigu Joe Hill. Nenio helpis!

Malgraŭ ŝtormego da protestoj okazis la kondamno de Joe Hill. En grizmalvarma matenkrepusko la 19an de novembro 1915 oni mortpafis Joe Hill sur la prizona korto en ŝtata prizono Salt Lake City. Frue oni promesis ke kvar de liaj kunuloj/kolegoj/amikoj povus akompani lin dum ekzekuto. Sed sen lia scio la prizona direktoro ne lasis ilin alveni. Ekster la prizono atendis granda amaso de homoj. Ili nur aŭdis la sonoj de pafoj.

Sed la adiaŭa krio de Joe Hill al siaj kunuloj restis ne responditaj. Joe sidis fikse je seĝo kun okulbendo.

(el alia fonto: Liaj lastaj vortoj antaŭ la ekzekuto (la 19-an de novembro 1915) estis: “Ne funebru pri mi - organizu vin!”)

Je la funebra procesio partoprenis 30 000 homoj por akompano.

Joe Hill volis ke lia cindro estus disdonita en pluraj etaj kovertoj kaj disdonitaj al ĉiuj usonaj ŝtatoj krom Utah kaj al landoj tutmonde. Unu el tiuj kovertoj estis al sveda sindikatulo Ragnar Johansson, kiu diŝjetis la cindron sub ĉeriza arbo ĉe la Joe Hill-domo

en Gävle.

La kantoj de Joe Hill estas eldonitaj dum pluraj jaroj en kantaro "Den lilla röda" (Eta ruĝa) – labordonantoj nomas ĝin "Den lilla röda djävulen" (Eta ruĝa diablo)

La kantoj poste estas parto de la usona kantoheredaĵo kaj inspiris kantistoj kiel Woody Guthrie, Bob Dylan, Johnny Cash kaj Bruce Springsteen. (Pete Seeger)

Joe Hill-Domo

1880 la familio Hägglund aĉetis la domon je adreso: Nedre Bergsgatan 28 en Gävle urboparto la malnova Gävle 1902 ne plu en la familio.

1969 SAC aĉetis la domon. SAC = Sveda sindikatista organizo

Nun muzeo malfermita ĵaŭde kaj sabate 12-16

www.joehill.se



Bildo el la Joe Hill-domo. Nuntempe muzeo.

Novaĵoj de libroservo de SLEA

Libroj




La minuto preskribita por la sturmo

- Jérôme Leroy

Scienc-fikcia romano, kiu portas nin al... Lilo antaŭ la fino de la mondo.

Eldoninto: SAT-EFK

Prezo: 150 kr




Vojaĝo de Onia

- Kim Onnuri

Legolibro kun multaj ilustraĵoj bazita sur vojaĝo de la aŭtoro tra Eŭropo.

Eldoninto: Korea E-Asocio

Prezo: 80 kr



Memorindaj anarkiistoj kaj anarkiisma esperantismo.

Librecana antologio kun tekstoj de Federica Montseny kaj Dolores Marin

- Miguel Fernández

Librecana antologio kun tekstoj de Federica Montseny kaj Dolores Marin.

Eldoninto: SATeH

Prezo: 80 kr



Nek pardono, nek redono - Raoul Vaneigem

La libro okupiĝas pri "la demando pri senpuneco en krimoj kontraŭ la homaro".

Eldoninto: SAT-EFK
Prezo: 80 kr

T-ĉemizoj



T-ĉemizo "Vira"

Grandecoj: malgranda, meza, granda, grandega

Prezo: 150:- Membra prezo: 100:-

Por pli da informo vizitu www.slea.se | För mer information besök www.slea.se



T-ĉemizo "Virina"

Grandecoj: malgranda, meza, granda, grandega

Prezo: 150:- Membra prezo: 100:-

**Sendu mendojn al la retpoŝtadreso aŭ al la adreso de SLEA sube:
Beställningar skickas till epostadressen eller postboxen nedan:**

Retpoŝto:

slea.smolando@hotmail.com

Adreso de SLEA:

Svenska ArbetarEsperantoFörbundet
Box 64
563 22 Gränna
Sverige / Svedio

Afrankoj aldoniĝas je sendo de libroj/broŝuroj.

Plusgiro: 53160-8
(Sv.Arbet.Esperanto.förb.)

Birdo elektas la fuĝon - sed ni nenie!
La fuĝo destinis nin. Tial ni estas ĉi tie
Vi, ne destinitaj al fuĝo, tamen liberon havas vi,
helpu nin elteni la pezan fuĝon, kiun portas ni.

Kateno elektas piedon. Ni decidis migri.
La nokto kompatis nin. Nun ni estas ĉi tie' -
-Vi tro multas, eble diras liberul' en sekurec'
Ĉu ni tro pliiĝu, ni sciante, kio estas liberec' ?

Neniu elektas mizeron - certe ne ni
Survoje elektis ĝi nin. Nun ni estas ĉi tie
Vi, ne destinita al fuĝo! Ni scias pri gravec' de liberec'!
Helpu nin valori liberecon, kiun portas ni.

- Stig Dagerman, 1953

